DOKUMENTACIJSKI ESPERANTSKI CENTAR
DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO

Bana Jelačića 138A, HR-48350 Đurđevac, Kroatio - e-mail: dec.kroatio@gmail.com - tel. 098 248 574

# RAPORTO PRI LA 11-a KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

Dekunu jarojn post la lasta kongreso de kroataj esperantistoj, organizita de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac en Koprivnica en la jaro 2012, la sama organizanto okazigis la 11-an kongreson en Đurđevac inter la 30-a de junio kaj 2-a de julio 2023. Dum kelkaj antaŭaj jaroj Kroata Esperanto-Ligo kiel tegmenta organizaĵo ricevadis demandojn de siaj membraj societoj rilate la okazigon de kongresoj, kaj la oficialan peton por publike diskuti pri tiu temo, sendis Bjelovara Esperantista Societo la 23-an de septembro 2021, pri kio oni diskutis dum la Liga jarkunveno la 25-an de septembro 2021 en Bjelovar, sekve de kio la 23-an de oktobro samjare, la Ligo publikigis la konkurson por kongresaj organizantoj. Ĉar al la konkurso por organizantoj anonciĝis neniu societo, sian proponon organizi la kongreson en Đurđevac sendis Dokumenta Esperanto-Centro la 1-an de novembro 2022. Kroata Esperanto-Ligo akceptis la kandidatiĝon de DEC la 4-an de decembro 2022, kaj komence de 2023 startis la kongresaj preparoj. Estis formita la organiza komitato konsistanta el Zdravko Seleš (prezidanto), Josip Pleadin (sekretario), Nada Pleadin (kasisto) kaj membroj Velimir Piškorec, Mihaela Cik kaj franca volontulino Yentl-Rose Hemelrijk el Tuluzo, dum Kroatan Esperanto-Ligon en la Komitato reprezentis la prezidanto de la Ligo Anto Mlinar.

Por la kongresaj bezonoj, en sia retpaĝaro DEC disponigis ĉiujn necesajn informojn kaj ofertis la eblecon de reta aliĝo kaj mendado de servoj. Al la kongreso aliĝis, aŭ senanonce venis ĉirkaŭ 120 personoj, el kiuj ĉirkaŭ 90 vere partoprenis la kongreson. Krom kroataj esperantistoj, aliĝis ankaŭ esperantistoj el Bosnio kaj Hercegovino, Slovenio, Serbio, Hungario, Pollando, Francio, Burundio kaj Respubliko Koreujo. El la eksterlandaj esperantistoj plej grandan intereson montris hungaroj pro la proksimeco de Đurđevac kaj pro la interkonsento pri kunlaboro inter KEL kaj HEA, subskribita en 2011.

Sian subtenon al la kongreso donis Urbo Đurđevac kaj Departemento Koprivnica-Križevci, kiuj atribuis al la kongresa organizanto financojn de 2.015 eŭroj (Urbo Đurđevac), respektive 400 eŭroj (Departemento Koprivnica-Križevci). Urbo Đurđevac por la kongresaj bezonoj senpage disponigis ankaŭ la lokan Kulturdomon. La kongreso tamen grandparte estis financata de la kongresanoj mem, kio pruvas, ke tia aranĝo ankaŭ estonte povus okazadi, eĉ se en la plej modesta formo. La sumo de ĉiuj kongresaj kostoj atingis ĉirkaŭ 10.000 eŭrojn, el kio proksimume tri kvaronoj estis financataj per pagoj de la kongresanoj, dum unu kvaronon financis la loka kaj regiona aŭtoritatoj.

La programo konsistis el labora, kultura kaj turisma partoj. En la labora programo, plejparte okazinta dum vendredo (la 30-an de junio), en la Ĉasista domo Peski unue okazis ronda tablo pri la temo „Stato kaj perspektivoj de Esperanto en Kroatio”, kiun gvidis Ankica Jagnjić. La rondan tablon partoprenis kvidenko da personoj, parte ankaŭ eksterlandanoj, pro kio la tuta diskuto okazis en Esperanto. Pridiskutitaj estis kelkaj temoj, el kiuj du proponis DEC, unu Esperanto-societo Split, kaj unu Marija Jerković, respektive Renato Corsetti. Unue oni diskutis pri la propono de DEC, ke al ĝi estu komisiita konstanta organizado de sekvaj kongresoj en aliaj urboj. Estis argumentite, ke potencialaj societoj por organizado de ĉi tiu

aranĝo daŭre mankos, ĉar temas pri granda organiza laboro kaj sufiĉe granda financa risko, kiujn la societoj ne volas akcepti. Pro tio evoluis pozitiva diskuto kiu montris, ke plej multaj el la ĉeestintoj pretus akcepti la proponon de DEC, kiu estis sendita al la jarkunveno de KEL por aprobo. Sammaniere estis pritraktita ankaŭ la dua propono de DEC pri gvidado de la registro de esperantistoj en Kroatio, rilate kiun estis esprimitaj rimarkoj pri eblaj problemoj kun ĜDPR, sed ankaŭ ĉi tiu propono estis sendita al la jarkunveno. La propono de Esperanto-societo Split rilate la membrokotizojn ne estis diskutita, sed estis rekte sendita al la jarkunveno por pritrakto, kaj pri la demando de Renato Corsetti, ĉu Kroatio pretus organizi iun el la estontaj universalaj kongresoj de Esperanto, estis eprimita la opinio, ke ĉi-momente tio ne estas reala, kaj ke estus necese dum kelkaj sekvaj jaroj fari ampleksajn antaŭpreparojn.

En la jarkunveno de KEL, okazinta tuj post la ronda tablo, estis akceptita la propono pri koncesio por organizado de kongresoj de kroataj esperantistoj, kiu estis donita al DEC por kvin sekvaj jaroj. Estis akceptita ankaŭ la decido pri komisio de administrado de la registro de esperantistoj en Kroatio al DEC.

Por la kongresaj bezonoj estis eldonita kongresa libro en 150 ekzempleroj, kiun presis la Presejo Horvat en Bjelovar, kaj la kostojn kovris Departemento Koprivnica-Križevci. En la kongresa libro, krom bezonataj informoj por la kongresanoj, estis publikigitaj salutvortoj de Hrvoje Jančі, la urbestro de Đurđevac kaj de Darko Koren, la estro de la Departemento Koprivnica-Križevci.

La kongresanoj loĝis en la Ĉasista domo Peski, kiu estis komplete luita de Hrvatske šume, krome en la Hotelo Picok kaj ĉe privata luiganto Apartmani Tina.

Dumkongrese estis prezentitaj pluraj libroj, kiujn dum pasintaj monatoj publikigis DEC. Tiu siapeca „literatura maratono" okazis la 30-an de junio en la Urba biblioteko, kunlabore kun ĝia direktorino Bernarda Ferderber. Ĝi komenciĝis per la ekspozicio „Kvardek jaroj de Esperanta eldon-agado en Đurđevac", post kiu okazis prezento de du libroj. Komence estis prezentita la Esperanta eldono de la romano „Ruta Tannenbaum" de Miljenko Jergović, kiun kuntradukis Tomasz Chmielik kaj Josip Pleadin, kaj kiu aperis en la serio „Nordo-Sudo" sub la nuemro 11. La aŭtoro, bedaŭrinde, ne povis partopreni la prezenton, sed li sendis sian filmitan alparolon al la kongresanoj. Pri la libro parolis Zdravko Seleš, kaj la ĉapitrojn legis Mihaela Cik.

La duan libron, „Svjetlana – Rakonto pri nekutima infanaĝo" en Esperanto, verkitan de Luca Cetinić el Split, en longa parolado prezentis psikologino kaj infana poetino Milijana Kovačević el Split, kaj la ĉapitrojn legis Mihaela Cik.

Komuna vespermanĝo por la kongresanoj okazis la 30-an de junio je la 20h00 en la Ĉasista domo, post kio estis koncize prezentita la infanlibro „Aliaj pordoj malfermiĝas" de la israela verkistino Luiza Carol. Pri la libro mallonge parolis Jozefo Nemeth el Hungario, cetere unu el la ilustristoj, kaj Josip Pleadin nome de la eldonisto.

La ĉefa kongresa programo okazis sabate, la 1-an de julio en la Kulturdomo de Đurđevac, en kies vestiblo estis starigita pentraĵ-ekspozicio titolita „Azia paletro" de la korea pentristo kaj esperantisto Ho Song, post kio inter la 10h00 kaj 12h30 okazis la oficiala programo, gvidita de Zdravko Seleš (en Esperanto) kaj Ivanka Seleš (en la kroata), kaj la oficiala tradukisto estis Neven Kovačić. Post la enkondukaj vortoj de la prezidanto de la Organiza komitato Zdravko Seleš, la kongresanojn salutis la urbestro de Đurđevac Hrvoje Jančі kaj Ratimir Ljubić, anstataŭanto de la departementestro Darko Kroen. Sekve parolis sinjorino Ivana Kurtović Budja el la Instituto por la kroata lingvo kaj lingvistiko el Zagrebo pri la temo de proklamo de Esperanto kiel nemateria kultura havaĵo de Kroatio. En la muzika parto de la programo prezentiĝis koncerte Neven Mrzlečki kaj Saša Pilipović, kaj en la finalo Ankica Jagnjić informis la kongresanojn pri la rezultoj kaj konkludoj de la ronda tablo kaj de la jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo.

Komunan fotadon antaŭ la Kulturdomo realigis profesia fotisto Siniša Milašinović, kaj la tutan programon filmis la studio „Matej" el Bjelvoar.

Je la 13h00 la 1-an de julio en la Preĝejo de sankta Georgo en Đurđevac, kun partopreno de kvindeko da esperantitoj, franciskano Rikard Patafta el Bjelovar celebris sanktan meson en Esperanto, por kiu li preparis ankaŭ apartan broŝuron. La meso okazis kun la konsento de la paroĥestro de Đurđevac Tomislav Leskovar.

Post la meso, la partorpenintoj kolektiĝis sub tendoj apud Dokumenta Esperanto-Centro, kie estis organizita komuna tagmanĝo. La manĝaĵojn liveris la Ĉasista domo Peski, kaj kukojn bakis Marijanka Pleadin. En la porokaza programo, la prezidanto de KEL Anto Mlinar, oficiale malkovris la novan marmoran memortabulon kun listo de donacintoj de DEC, kiu anstataŭis la provizoran tabulon starigitan en 2019. Samtempe kvar ejoj en la domo de DEC ricevis la nomojn de grandaj donacintoj (Herolt Rheyd Mountbatten, Erhard Claus, Radenko Milošević kaj Etsuo Miyoshi), same kiel tri arkivaj ŝrankoj aĉetitaj per mondonacoj de la Fondaĵo Esperantic Studies Foundation el Usono kaj de Branko kaj Marija Repac el Zagrebo. Per malkovro de la memortabulo, Dokumenta Esperanto-Centro estis oficiale malfermita por la publiko. La memortabulon ĉizis kaj muntis la firmao „Mirta" el Bjelovar.

En la konferenca ĉambro de DEC dum la posttagmezaj horoj la 1-an de julio okazis renkontiĝo de sep gelernantoj el la Dua elementa lernejo el Bjelovar, gviditaj de sia instruistino Snježana Kranželić, kun la aŭtorino de la libro „Svjetlana" Luca Cetinić.

Dum vesperaj horoj la kongresanoj neformale amikumis en la Malnova urbo.

La trian kongresan tagon, la 2-an de julio (dimanĉo), oni pasigis ekskursante en Suhopolje (kastelo Janković), Virovitica (kastelo Pejačević) kaj Grabrovnica, kie oni vizitis la naskiĝdomon de la kroata poeto Petar Preradović. La transporton organizis firmao „Vuk" el Đurđevac, kaj la ekskuro finiĝis per tagmanaĝo en la Hostelo Borik, kie kolektiĝis kvindeko da ekskursantoj.

Pri la kongreso aperis pluraj raportoj en la radiostacio Podravski radio, en la retpaĝoj de Urbo Đurđevac, Departemento Koprivnica-Križevci kaj Kroata Esperanto-Ligo, en la gazeto „Glas Podravine i Prigorja", en la portaloj epodravina.hr, dravainfo.hr kaj aliloke. Multaj raportoj kaj komentoj de la partoprenintoj aperis ankaŭ en sociaj retejoj.

La kongresa programo estis riĉa kaj diversspeca, kaj en kelkaj okazoj ŝajnis, ke estis tro da programeroj, inter kiuj ekzistis nesufiĉa tempo por leĝera amikumado, pri kio atentigis ankaŭ kelkaj kongresanoj. La plej granda problemo montriĝis malfruiĝo de unuopaj programeroj, sed plejparto de la kongresanoj pritaksis tre pozitive la organizadon kaj la ofertitajn programojn. La organizanto mem ĉiujn kritikojn kaj laŭdojn pritraktis kaj konsideros ilin dum organizado de estontaj aranĝoj.

En Đurđevac, la 17-an de julio 2023

La raporton kompilis:
Josip Pleadin, kongresa sekretario